

# ELNA - BULTENO

Oficiala Esperantlingva Organo de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, N-ro 22. Oktobro, 1973. Redaktis Karl Pov, 1014 Weymouth Avenue, San Pedro, CA 90732. Helpredaktis R. T. Sandberg.

## SURVOJE AL STARIGO DE CENTRA OFICEJO

ELNA ricevis provizoran savon de la krizo, kiun alportus plena manko de informcentro kaj libroservo. Ges-roj William kaj Catherine Schulze konsentis labori eĉ post la fino de ĉi tiu jaro, ĝis ELNA starigos veran Centran Oficejon. S-ino Schulze, Vicprezidantino de nia Ligo, verkis detalan proponon pri la laboroj plenumotaj kaj la probabla proksimuma kosto de la Oficejo.

La ejo mem devos esti sufiĉe ampleksa por dosierŝrankoj, stoko da libroj kaj informiloj, kaj loĝanta direktoro. Kvankam tute ne necesus, estus oportune, ke ni loku ĝin proksime al la nuna informcentro, do en Burlingame, por ke transporto de la materialoj ne estu granda problemo, kaj ankaŭ pro tio, ke ges-roj Schulze povus helpi spertigi la direktoron iomete. Domo en la tiea komerca distrikto lueblas je ĉirkaŭ \$400 monate. Plej saĝe estus lui, ne aĉeti, almenaŭ dum la unua, eksperimenta jaro. Monata buĝeto aspektus jene:

Lukosto, elektra energio, telefono	\$500
Salajro por direktoro	600
Parttempa librotenisto	400
Helpantoj (verŝajne gimnazianoj, por paki librojn ktp.)	200
Diversaĵoj (papero, preskostoj, afranko, tajpilo ktp.)	300
Sumo (monata)	\$2,000

Kun modesta mildolara marĝeno, tio estus (nur proksimume!) \$25,000 jare. Kie estos la fontoj?

Du fontoj estas evidentaj: la kotizoj kaj la libroservo. La kotizoj provizos eble \$5,000, la libroservo minimume \$2,000, sed restas ankoraŭ la plej granda parto, \$18,000. ELNA mem kompreneble starigos fonduson, sed la estraro bone komprenas, ke la poŝoj de la ligano ne estas senfundaj. Necesos serĉi monon pli persiste ol iam antaŭe ekster la movado.

## VENONTAJ KONGRESOJ KAJ KONFERENCOJ

La 21a Kongreso de nia Ligo okazos en Ĉikago, Ilinojso, de la 27a ĝis la

29a de decembro 1973, samtempe kiel la jarkunveno de MLA (Asocio pri Modernaj Lingvoj). Tiu aranĝo estos aparte oportuna por la profesiaj lingvistoj inter ni, ĉar du el la seminarioj ĉe MLA estos "Esperantaj Lingvo kaj Literaturo," sub prezido de Prof. Carlton Carroll, kaj "Interlingvistiko," kie Prof. Richard E. Wood pritraktos la temon "Socilingvistikaj kaj Kulturaj Konsekvencoj de la Estiĝo de Internacia Lingvo." La 28an de decembro la tuta ELNA-Kongreso povos ĝui la tradician Zamenhof-Bankedon de la Esperanto-Societo de Chicago. Kongres-ejo estos Allerton Hotel, kaj ĉambron oni povas jam nun rezervigi pere de s-ro R. Kent Jones, 3318 N. Lake Shore Drive N. 801, Chicago, Illinois 60657.\* La 21a estos nepre inter niaj plej brilaj kongresoj, kaj ju pli da aliĝoj, des pli brile ĝi sukcesos!

La Tut-Kalifornia (aŭ Esperanto-Pacifika) Konferenco ne okazos en Rosarita, kiel ni antaŭe anoncis, sed en la...fama landlima urbo Tihvano, Meksikio. Aventuremo, se ne ankaŭ risort-tranĉiloj, necesos tie! La hotelo El Conquistador, bonŝance iom ekster la urbocentro, estos konferencejo, de la 5a ĝis la 7a de aprilo 1974. Por certigi ricevon de pliaj detaloj, skribu al s-ro Francis E. Helmuth, 5526 Beaumont Avenue, La Jolla, California 92037.

La 22a ELNA-Kongreso okazos en Spokane, Vaŝingtonio, de la 21a ĝis la 23a de junio 1974--samtempe kiel Mond-Ekspozicio 1974--ĉe Whitman College. Tio ĉi estas efektiviĝo de la deziresprimo, ke la landa kongreso estu en kadro de iu regiona konferenco, ĉar la 22a fakte estos la jam planita Pacifika Nord-okcidenta Konferenco. Estas flustra onidiro, ke la reprezentantoj de la Ĉina Esperanto-Ligo ĉe la 60a Kongreso de Japanaj Esperantistoj montris intereson pri ebleco veni al ELNA-Kongreso, do nia prezidanto, d-ro E. James Lieberman, faras al ili oficialan inviton al Spokane.

\* Vidu la aliĝilon ĉe paĝo 7.

La du plej gravaj mondaj kongresoj de Esperanto ne koincidos en 1974, do eblos veni al ambaŭ. La 47a SAT-Kongreso okazos en Bergamo, Italujo, kaj la 59a Universala Kongreso en Hamburgo, Germanujo. Precizajn datojn ni anoncos poste. Se sufiĉe da partoprenontoj sin anoncos, estos vojaĝa kurso de Esperanto sub aŭspicio de San Francisco State University. La kurso estos instruata de William Auld, kies tradukon "Epifanio" (angle "Twelfth Night") de Ŝekspiro oni surscenigos ĉe la Kongreso. Kursanoj partoprenos la Universalan Kongreson kiel oficialan parton de la kurso.

#### NEKROLOGO: CHANNING L. BETE, SR.

Ĝus alvenis sciigo, ke Channing L. Bete, Sr., mortis la 18an de aŭgusto je koratako. Bete entuziasmiĝis pri Esperanto malfrue en la vivo, kiam li partoprenis kurson ĉe San Francisco State College sub magistro William Auld en 1970. Li estris eldonejon Channing L. Bete Co., Inc., kiu eldonis la tre allogajn informbroŝurojn The ABC's of Esperanto kaj About Esperanto, kaj la elementan kurson A First Course in Esperanto de William Auld kun kasetaj sonbendoj. Dum sia relative mallonga esperantisteco, Bete faris gravegan laboron por nia afero.

#### KOREKTOJ

Enŝteliĝis kelkaj eraroj en la lasta numero, el kiuj ni volus korekti la pli gravajn. P. 1, live, -6, "Post longan" estu "Post kiam longan"; p. 4, live, -5, "malŝaton"; p.5, live, -5, "Nov-Hampŝiro"; p. 7, live, 7, "\$1.95" estu "\$2.35"; p.7, dekstre, 20, "loĝas."

#### HISTORIO DE CIRCLEVILLE, OHIO

Malmultaj usonanoj scias tiom pri la historio de Circleville, Ohio, kiom aperas sur ĵus eldonita faldfolio en traduko de Lewis Cook, Jr. Ĝi inkluzivas ĉion, kion vi volis scii pri Circleville sed ne kuraĝis demandi, ekde la epoko de Kristo! Por ricevi la faldfolion, sendu afrankitan kaj adresitan koverton al s-ro Lewis Cook, Jr., Box 442, Circleville, Ohio 43113.

#### ĈE LA SKOLTOJ

S-ro John Kailento de Staten Island, Nov-Jorkio, metis informojn pri Esperanto en la lokan skoltan bultenon kun anonco, ke li donos ĵamborean subvencion al skolto kiu akiros la Interpretistan Medalon. Li ankaŭ ofertis helpi al skoltoj lerni la lingvon internacian.

#### ESPERANTO EN SUBTERA BILDSTRIKAJERO

Amantoj de sciencfikcio ofte trovas aludojn pri nia lingvo kaj eĉ dialogon esp-an en diversaj verkoj de tiu ĝenro, de interalie Philip Jose Farmer, Harry Harrison kaj Mack Reynolds. Certe inter la plej kuriozaj ekzemploj de tia utiligo de la lingvo internacia lokiĝas la nigra-blanka subtera bildstrikajero Rowlf de Richard V. Corben, eldonita de Rip Off Press en 1971. La intrigo temas pri hundo kiu magie ricevas homan figuron, sed alie retenas hundan aspekton. Ĉi tiu duonhomo devas savi sian mastrinon de armeo de demonoj, kiuj parolas inter si jermaniere:

"Ŝi estas unuanbataleman publikinon!"  
 "La ĉefo estas ricevanta la plejbone bel-etajn virinojn." "Ĉu estas la lokon?"  
 "Jesi! Mi estas revena nian bazon. Vi havas la komandon...Permesu neniuon je vivi!" "Rapidigi! Formu vicoj!...Vi estas pli teda ol snala krapo!"

Ŝajnas, ke tiu armeo lernis Esp-on laŭ la ekzemploj en The Aggressor Language! Se vi tamen deziras ekzempleron por via muzeo de aĉaĵoj, mendu rekte de Rip Off Press (50¢ plus 15¢ afranko), Box 14158, San Francisco, CA 94114.

#### EL LA FUNDAMENTA KRESTOMATIO

"Memvola vivisekcio. Du Amerikaj kuracistoj antaŭ nelonge publikigis en la gazeto 'New-York Herald' originalan anoncon, en kiu ili proponas 5000 dolarojn da rekompenco al la persono, kiu konsentus, ke oni faru al ĝi operacion, konsistantan en farado de truo en la stomako kaj fermado ĝin poste per vitro, por farado de esploroj super la funkciado de la stomako. Al tiu ĉi propono alsendis sian konsenton 142 homoj, precipe laboristoj. La 'feliĉa elektito' fariĝis unu atleto, kiu ne havis sukceson en la cirkoj."

La ĉi-supran artikoleon, tiritan el la sekcio "El la vivo kaj sciencoj" de nia Fundamenta Krestomatio, ni ne

reprezis kiel modelon de stilo. Sed kurioza ĝi ja estas, kaj ne nur el lingva vidpunkto! Se iu ELNA-ano povus elserĉi pli detalajn informojn pri la nekutima operacio kaj ĝiaj sekvoj, li/ŝi bonvolu ilin komuniki al la redaktoro.

#### USONO EN NIA INTERNACIA GAZETARO

El Popola Ĉinio, n-ro 6 de 1973, enhavas iom malesperigan artikolon pri "Nova Monkrizo en Kapitalisma Mondo," kiun sekvas priskriba listo de la naŭ "Krizoj de la Usona Dolaro" ("La naŭa estas la nuna.").

En Hungara Vivo n-ro 2, 1973, aperas jena ŝerco: "Prezident-elekto okazas en Usono. Raportisto intervjuas personon atendantan antaŭ elekto-budo: 'Kion vi opinias pri la du kandidatoj?' 'Feliĉe ankoraŭ, ke oni povas elekti nur unu el ili.'"

#### ĈE LA ESPERANTO-KLUBO DE LOS ANGELES

EKLA estas inter la plej aĝaj kaj multnombraj grupoj sur nia kontinento. Ĝi ĝuas duoble favoran pozicion: en Kalifornio, kie estas pli da esperantistoj ol en iu alia ŝtato usona, kaj ĉe la marbordo, kio helpas la kelkfojan alvenon de eksterlandaj gastoj. Prezidanto-Kasisto estas William W. Glenny.

En marto okazis anglalingva ekspozicio kaj pridiskuto de aktuale disponeblaj lernolibroj. Tiu tute anglalingva programo malplaĉis al kelkaj, sed allogis multajn interesiĝantojn. Ŝajnas ke, kiel tre malofta kaj escepta afero, nacilingva programo povas tamen utili.

Por la aprila kunveno juna talentulo Briĉjo Burg kantis kaj konatajn "popolkantojn de Esperantujo" (Jen nia mondo ktp.) kaj du originalaĵojn, la "bibop"-stilan Unuiĝu kaj la pli trankvilan Unu belan rozon. (Tekstoj espereble aperos tie ĉi baldaŭ.)

En majo amaso da esperantistoj kunpremiĝis en la hejmon de la prezidanto por spekti la teatraĵon Proksima nekonato. Tiun kulture elstaran eventon EKLA ŝuldas al la Universitato Fort Lauderdale, kiu patronas la vojaĝon de la famaj geaktorj Zbigniew Dobrzynski kaj Kalina Pienkiewicz tra Usono.

La junia kunveno provizis kelkajn surprizojn. La gasto, germana sámidiano Karl Weller, lastmomente informis, ke li ne povos veni. Bonŝance jam troviĝis

dua prelegisto, John H. Fulton, kiu intencis prezenti lumbildaron. La surprizo estis, ke apenaŭ restis duonhoro por tiu prezentado post neplanita diskuto pri plej diversaj klubaj aferoj. Eble la plej interesa diskuttemo estis la Zamenhof-bankedo, kiun EKLA tradicie okazigas ĉiudecembre. Kelkaj revoluciemaj junuloj aŭdacis proponi ke la vivo kaj idearo de nia majstro estas elĉerpitaj malaktualaĵoj, kaj ke la bankeda programo devus sin okupi pri pli gravaj aferoj. Ilin rebatis Sandor Bako, certe la plej talenta oratoro en la klubo kaj nepre inter la plej elstaraj de Usono, dirante, ke la vivo de Zamenhof havas tiom da aspektoj, ke ĝi vere ne estas elĉerpebla. La debato verŝajne daŭros!

Specialan duan junian kunvenon oni alvokis okaze de la efektiva alveno de s-ro Weller, kiu faris al la ĉeestantoj tre interesaktan prelegon pri sociala asekuro kaj rilataj aferoj en sia lando, Germanujo. Li diris, ke vidante sepdekjaran usonan kelnerinon, kiu ne nur ankoraŭ laboras sed estas eĉ tre kontenta pri tio, li tre surpriziĝis. Li konkludis, ke la socialaj servoj en Europo ĝenerale estas pli evoluintaj ol en Usono. Sekvis vigla horo da demandoj kaj respondoj.

Nu, jen EKLA. Kial via redaktoro malŝparis tiom da spaco por priskribi la agadon de unu loka grupo? Pro tio, ke klubaj novaĵoj devas esti parto de nia bulteno. Pli bone estus emeti novaĵojn pri pluraj kluboj. Sed por tio via redaktoro bezonas informojn! La redaktoro eĉ ne scias, kiom da lokaj grupoj efektive ekzistas, do li bezonas vian helpon. Sendu la informojn al Karl Pov, 1014 Weymouth Avenue, San Pedro, CA 90732. Antaŭdankon!

DE LA ESPERANTO-SOCIETO DE CHICAGO venis la jenaj informoj preskaŭ tuj post kiam la ĉi-supra artikolo estis kompostita:

R. Kent Jones estas la prezidanto de la ESC. Ĝiaj programoj tuŝas diversajn aspektojn de lingvaj problemoj, kaj la personoj kiuj prelegas al la membraro estas el tre diversaj organizoj.

Ekzemple, ĉe la januara kunveno la temo estis "Nuntempaj Jugoslavaj Lingvoj" kaj la prelegisto estis reprezentanto de la Jugoslava konsulejo en Ĉikago. Februare, la ESC-anoj aŭdis pri turismo kaj lingvo en Ilinojso pere de la buŝo

de oficisto de tiu ŝtato. Marte, pri gesta lingvo parolis reprezentanto de organizo por surduloj. Aprile, lingvisto el la Universitato de Ĉikago donis al la membroj informojn pri la nuna stato de komputera traduko. En majo, "Sciencaj Tradukoj" estis la temo kaj reprezentanto de la Nacia Tradukcentro estis la parolanto. La junia temo: "La Haveblaj Libroj"; parolanto: reprezentanto de la Biblioteko de Internaciaj Rilatoj en Ĉikago. Julie, pri "Reklamoj en 70 Lingvoj" parolis s-ro William Grant de la firmo Grant Advertising kies klientaro reklamas en pluraj landoj. Aŭguste, membro de la Altrusa Klubo parolis pri "Lingva Banko de 45 Lingvoj" fondita de tiu organizo post kiam maristo mortis ĉar li ne povis angle klarigi siajn simptomojn al kuracisto. Post ĉiu prelego, la prelegisto respondis al demandoj de la aŭskultintoj. En oktobro, ESC-anoj aŭskultos oficiston de la Centro por Internaciaj Vizitantoj en Ĉikago pri la funkciado de tiu centro kaj oficiston de la Ĉikaga Metropola Saniga Distrikto pri terglobskala malpurigado de akvo kaj aero. La avantaĝo de ĉi tiuj prelegoj ne nur estas la gajno de valora kaj unika informo, sed ankaŭ la disvastigo de informo pri Esperanto en la kelkaj organizoj el kiuj venas la prelegistoj.

Krom la ĉiumonataj kunvenoj, la ESC organizis dum junio kaj julio serion de seminarioj pri tradukoj el la angla lingvo en Esperanton. Dek du membroj preparis unupaĝan tradukon el la literaturo de sia fako. Post laŭtleĝo de sia traduko (la ĉeestantoj havis kopiojn kaj de la angla originalo kaj de la traduko), la tradukinto parolis pri la tradukmalfacilaĵoj trovitaj kaj klarigis siaj solvojn. Poste li respondis al demandoj.

La tradukintoj kaj iliaj fakoj estas: s-ro Scott Turton, medicino; s-rino Julie Regal, registaraj statistikoj; d-rino Gertrude Novak, patologio; s-ro Paul Fox, komputeroj; s-ro Peter Anderson, bibliotekscienco; d-rino Margaret Hagler, literaturo; s-ro Mark Koukol, radio; s-ro George Neumann, librokolektado; s-ro Randolph Clark, trafikaj reguloj; s-ro Richard Sandberg, financo; s-ro John Kral, maŝinoj; s-ro Robert Runser, aviadaj aferoj.

D-ro John Lewin vizitis Ĉikagon la unuan semajnon de junio kaj persone kontaktis pri Esperanto tiom da altranguloj

de kluboj, profesiaj asocioj, edukaj fakoj ktp., ke ne ekzistas sufiĉe da spaco ĉi tie por nomi ĉiujn. Ni menciis nur la Amerikan Medicinan Asocion (AMA), la Amerikan Bibliotekan Asocion (ALA), la klubojn Kiwanis, Rotary kaj Lions. La neta rezulto estas ke la plejmulto rimarkis ke ili akiris pli favoran opinion pri Esperanto rezulte la kontakton. Unu anoncis sian intencon ekstudi Esperanton kaj mendis E-librojn. La redaktoro de Journal of the American Medical Association donis permeson traduki en Esperanton iujn ajn artikolojn aperintajn en tiu revuo. (Kelkaj membroj de la ESC nun tradukas tiajn artikolojn por eventuala aperado en la Internacia Medicina Revuo kies redakcio estas en Japanujo.) La Klubo Rotary, tamen, ne ŝanĝis sian oficialan pozicion pri neniam oficialaj decidadoj rilate internaciajn lingvojn.

#### LA NOV-JORKA SOCIETO

raportas ke Marjorie Boulton parolos ĉe la Zamenhof-Vespero la 7an de decembro, 7:30 p.m., ĉe Freedom House, 20 W. 40 (kiu proksimas la publikan bibliotekon). Intertempe, ŝi enketas ĉe Universitato Princeton pri Charles Reade, fama brita romanisto. Por pli da informo, kontaktu Mark Starr, 39-40 47th Street, Long Island City, NY 11104.

#### LA PERSONA RAPORTO

de J. Pool pri la lasta U.K. aperis en la lasta numero de la ELNA-Newsletter.

#### NOVAJN KOTIZOJN

anoncas UEA pro la dolora dolara situacio kaj inflacio tra la mondo. Ili estas: MA kaj MA-K, \$14.00; MJ, \$7.00; MS, \$21.00; J-MJ, \$3.50; junulo kun jarlibro kaj Esperanto, \$10.50; nur abono al Esperanto, \$10.50; nur abono al Kontakto, \$3.75. La plialtiĝoj efektiviĝas tuj. La kotizo de dumviva membreco restos ĉe \$186.00 ĝis la fino de 1973. Sendu viajn UEA-kotizojn al Armin Doneis, P.O. Box 105, Pharr, Texas 78577.

#### VOLAS KORESPONDI:


S-ro Juan Ramón Amunategui, Bolonia no.2, Parque de las Avenidas, Madrid 28, Hispanujo. 19-jara studento.

S-ro Francisco Pinheiro Ramon, Soc. Recr. União Rosariense, 97590 Rosário do Sul, Brazilo. Muzikisto, delegito de UEA.

S-ro Julien Mostaert, St. Maria Aalterstraat 42, B-9880 Aalter, Belgujo.

## La SCIENCISTOJ EKOBSEKVAS

RAPORTAS  
RICHARD E.  
WOOD



La antaŭnelonga apero de la unua serioza scienca verko pri la sociologio de la parolantaro de la lingvo Esperanto--la mallonga sed enavoriĉa anglalingva artikolo "Esperanto kiel Socia kaj Lingva Movado," aperinta en grava nacilingva socilingvistika revuo, estas ankoraŭ unu indikilo, ke la epoko de la "malkovro" de Esperanto fare de sociologoj, lingvistoj, politikaj sciencistoj kaj diversaj aliaj fakuloj fine komenciĝis.

Ĉu tio estas atingo de Esperanto? Ĉu frukto de efika informado en kleraj medioj? Aŭ--male--ĉu ĝi nur estas atendebla en la nuna epoko, en kiu vivas 90% de la sciencistoj, iam ajn vivintaj ekde la komenco de la homa historio? Pli precize, ĉu ĝi nur dankiĝas al la konata premo sur universitatajn profesorojn diverslande, kies dekanoj kaj fakestroj ĉiam pli postulas, ke ili "eldonu aŭ elfalu," rezulte, ke ili daŭre serĉas eĉ la plej esoterajn temojn por fakuliĝo kaj rapida eldono de artikoloj kaj libroj?

Mi ne respondas rekte. Sed mi konsilas, ke ni ne tro fieru pri tiu lastatempa evoluo, kiu alportos ĉiam pli da esplorantoj el diversaj fakoj en nian socion por ĝin observi kaj priskribi per siaj samfakuloj en nacilingvaj fakaj revuoj. Kaj ni memoru, ke ni estas observataj. La sociologoj (kiel la brita sociologo Forster, verkinto de la menciita artikolo, kiu nun verkas tutan libron samteman), la antropologoj, la teoriaj lingvistoj, la historiistoj, jam estas inter ni. Ili notas nian konduton, nian socian organizon, nian uzon de la lingvo, nian historion.

Ne antaŭjuĝe, sed atente kaj strikte observe, ili observas la bonan kaj la nebonan. Kiam okazas senĝena interkompreno inter personoj el landoj kun diversaj nacilingvoj; kiam aperas valora literaturo; kiam denaska parolanto plene

nature posedas la lingvon; tion ili notas. Same notitaj tamen estas tiaj fenomenoj malpli pozitivaj kiel la "eterna komencanto," lingvaj fuŝoj, nacilingve bazita fonetiko, kongresanoj kiuj aŭdacas peti ke oni "parolu malpli rapide," emmovada batalado, vortaroj kaj gramatikoj ne bazitaj sur la hodiaŭa, parola lingvo (kun aparta atento al la denaskaj parolantoj), kaj lingva neunueco. Observataj estas la aĝo kaj socia rango de la parolantaro de la lingvo, interalie la integriĝo aŭ malintegiĝo de ĝiaj membroj en sian respektivan nacian socian vivon. Oni certe notas ĉiun indikilon de sekteco, de strangeco, de aparteco, de la estiĝo de nova etnio kun novaj bariloj kontraŭ la ekstera mondo--ne nur la lingvo, do, kiu per si mem distingas kaj dividas la parolantaron de Esperanto disde la neparolantoj, sed ankaŭ sociaj bariloj de aparta vivmaniero, apartaj moroj kaj kutimoj--ĉio tio estas observata kaj el tio la diversaj fakuloj tiros konkludojn pri nia lingvo, nia socio, kaj la estonteco de ambaŭ.

Ĉu tiu observado kaj verkado helpos nin? Ne necese. Ĉu antropologo, vivinta inter centrafrika gento kaj poste eldonanta en Eŭropo sciencan studon pri ĝi, iel helpas al ĝi? Kiel universitata instruisto interalie de antropologio, mi tion dubas. La fenomenon Esperanto, parenteze, certe ekstudos ankaŭ la antropologoj, kiuj nun ĉiam pli dediĉas sin ankaŭ al la socioj de la plej disvolviĝintaj landoj.

Ni estu tamen pretaj por la alveno de eksteraj fakuloj, pere de kies verkoj ni iĝos konataj, ĉu porbone, ĉu pormalbone, al la neesperantista mondo. Ĝis nun oni juĝis Esperanton ĉefe surbaze de nescio, nevolo scii, antaŭjuĝo. Abundegas la ekzemploj--oni trovu unu ŝokan, ekzemple, en la enkonduko de Lingvo kaj Vivo, de G. Waringhien. Responde, la esperantistoj frontis al la mondo per sia informado, ĉiam bonintenco, sed ofte naiva kaj nekonvinka al fakuloj diversaj.

La gravaj estontaj decidoj pri la eventuala oficialigo de Esperanto kaj ĝia taŭgeco por novaj uzoj, en novaj lokoj, probable dependos ne de nia propra volo nek de nia informa kampanjado, sed precize de la raportoj de tiaj eksteraj fakuloj, kiuj jam nun nin observas.

**SENNACIISMO:**

Kultura doktrino, kies ĉefaj celoj estas:

1) Malapero de ĉiuj nacioj, rigardataj kiel sendependaj, suverenaj unuoj; 2) Mondmastrumado k racia utiligado de ĉia energio k materio profite al ĉiuj homoj de nia planedo; 3) Unuecigo je ĉiuj mezuriloj k kalkuliloj; 4) Praktikado de sennacieca lingvo (Esperanto) kun la celo, ke ĝi fariĝu la sole uzata kultur-lingvo. Informojn liveras la landa peranto de la Sennaciista Frakcio de SAT, Karl Pov, 1014 Weymouth Avenue, San Pedro, CA 90732.

**TROMPIĜO**

(El la germana lingvo tradukita de Art Wendler. El la novaĵletero de la Esperanto-Societo de Iowa City ŝtelis via redaktoro.)

En kafejo demetis sinjoro sian ĵurnalon kaj diris al proksima fremdulo, "En ĉiu ĵurnalo oni legas plimulte la rakontojn pri ŝtelo, rabo, batalo kaj murdo, kaj la policanoj faras nenion. La krimulo estas malofte arestita aŭ punita."

"Vi false akuzas niajn policanojn, sinjoro. Nia polico estas tiel bona

kiel aliaj ie ajn," respondis la fremdulo.

"Ne kredu tion, amiko," diris la unua sinjoro. "Mi vetas kun vi dudek dolarojn ke mi povas iri en tiun kandobutikon, preni kelkajn ĉokoladojn, kaj, kiam mi elkuros la butikon, neniu persono, eĉ ne la policano, kiu staras antaŭ la butiko, haltigos min."

"Mi ne kredas tion," respondis la fremdulo. "Mi akceptas vian veton."

La sinjoro eniris la butikon, forprenis du ĉokoladojn kaj tiam eliris. Neniu persono aŭ haltigis aŭ arestis lin. La sinjoro reiris kaj diris, "Jen, kion mi diris? Donu al mi dudek dolarojn."

La fremdulo alprenis al si autoritatan mienon kaj diris, "Ĉi tiun fojon vi eraras, sinjoro! Mi estas poliestro kaj mi arestas vin pro la plenumita krimo."

"Ne, sinjoro poliestro," la unua sinjoro respondis. "Vi estas refoje trompita. Mi estas la posedanto de la kandobutiko!"

**ĈIUJN NOVAĴOJN**

por la ELNA-Bulteno bonvolu sendi al la redaktoro, Karl Pov, 1014 Weymouth Ave., San Pedro, CA 90732. Antaŭdankojn!

**ATENTU!** Esperanto Book Service anoncas ke, ĝis plua sciigo, ĉiuj almenaŭ dek-dolaraj mendoj de kotizintaj ELNA-anoj ĝuos 10%-an rabaton, ekskluzive de *Plena Ilustrita Vortaro*, *La Dia Komedio* kaj la kompleto kun kasetoj de *A First Course* de William Auld. Ankaŭ, por ĉiu trijara abono al *El Popola Ĉinio* (tarifon notu ĉe ĉi-numera reklamo), Esperanto Book Service kontribuos \$1.50 al la kaso de ELNA. Esperanto Book Service, P.O.Box 508, Burlingame, California 94010.

# El Popola Ĉinio

Esperanta Monata Ilustrita  
Specimeno akirebla senpage  
ABONTARIFO: 1 jaro \$2.20  
2 jaroj \$3.30  
3 jaroj \$4.40

ABONU ĈE: Esperanto Book Service  
P. O. Box 508  
Burlingame, CA 94010

